NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
jesusmiguel.garcia@ehu.es
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

NOVEMBRO/DECEMBRO 2007 **Nro. 72 (5/07)**




Sábado 15 de Diciembre, aniversario del nacimiento de L.L. Zamenhof.

TE ESPERAMOS EN EL GRUPO

LOKE ...

LOTERÍA DE NAVIDAD.



Ya estamos en los últimos días de venta de la lotería de Navidad del Grupo. El número que se llevará el "gordo" de este año es el **28.446**. Cada billete, íntegramente en Esperanto, cuesta 3,00 euros, de los que 2,50 son jugados en lotería y los 0,50 restantes quedan como donativo para el Grupo. Recordamos a todos que **no se hacen reservas**, así que el que se quede sin lotería, que no se lamente luego.

FIESTA DE ZAMENHOF.

El 15 de diciembre se celebra, en todo el mundo, el aniversario del nacimiento de Ludoviko Zamenhof y, como ya es tradicional, también en nuestro Grupo hacemos ese pequeño homenaje. Nos reuniremos, habrá una breve disertación, charlaremos y, como es típico de nuestra tierra, acabaremos alrededor de una mesa llena de los manjares aportados por los presentes, salvo el pan y las bebidas, que corren por cuenta del Grupo.

No lo olvides: te esperamos el **sábado 15 de diciembre**, a las **19,30 h.**, para pasar un rato agradable entre amigos.

PAGO DE CUOTAS 2007.

Volvemos a insistir: si a la izquierda de estas líneas encuentras una "X", es que aún no has pagado la cuota de socio correspondiente al presente año 2007. El importe a pagar y el número de cuenta en que la puedes hacer efectiva aparecen en la cabecera de esta circular. Gracias y esperamos tus noticias.

NUEVAS CUOTAS PARA EL AÑO 2008.

Os recordamos que, en la Asamblea General de este año, se aprobó un pequeño incremento de las cuotas anuales de socio para el próximo año 2008, así que, a partir del 1 de enero, éstas serán:

Cuota normal:	20,00 euros anuales.
Cuota reducida:	15,00 euros anuales.
Cuota familiar:	35,00 euros anuales.

Para facilitar el cobro, a aquéllos que aun no lo hayan hecho, les rogamos que nos hagan llegar un número de cuenta en la BBK y así, se podrán despreocupar de este pago anual pues nosotros mismos lo tramitaremos.

AITOR ARANA PREMIITA.

Aitor Arana Luzuriaga (Legazpi, Guipúzkoa, 1963) ha sido el ganador de la décimooctava edición del Premio Baporea, dotado con 10.000 euros, por la novela "Hilezkorrak". Se puede consultar en Internet la siguiente dirección:
http://prensa.grupo-sm.com/2007/09/aitor-arana-gan.html

Aitor estis interalie la tradukanto de "Memoraĵoj de eŭska bovino" al Esperanto kaj la verkinto de la lernolibro "Esperantoa ikasgai".

(Informis: Toño del Barrio (Madrid). 07/10/2007)

SIMBOLO POR LA 100-JARA UEA.

100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

Entute 19 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 12 landoj partoprenis la konkurson pri simbolo por la 100-jariĝo de UEA en 2008. La laŭreato, Guillem Sevilla, estas 24-jara grafika dezajnisto el Barcelono, membro de Kataluna E-junularo. Li klarigas, ke la simbolo emfazas "per simpla kaj aktuala aspekto, la tut-teran disvastiĝon de la neŭtrala lingvo Esperanto, atingitan grandparte danke al UEA".

La simbolo subtile rilatiĝas al tradiciaj esperantismaj identigiloj (stelo), sed ĝi uzas ankaŭ eksterajn identigilojn (parolvezikoj, kvin koloroj) rekoneblajn de la publiko, kiu ne konas la esperantistan heraldikon.

("Esperanto". N-ro. 1206. Septembro 2007)

E-KONGRESOJ POR 2008.

03/06 jul. Cuenca. Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio.

19/26 jul. Rotterdam. 93a Universala Kongreso.

26 jul/2 aŭg. Szombathely (Hungario). IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO.





Kiel ĉiam, pliaj informoj pri kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj, ĉe nia Grup-ejo. Ankaŭ informoj pri vojaĝeblecoj kaj kunvojaĝantoj.

H.E.F.

HEF-Oficejo.

La estraro de HEF deĵoras, persone, lunde inter la 17,30 kaj la 20,00 horo. Dum aliaj tagoj kaj horoj vi povas telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es, sed atendu ĉar vi ricevos la respondon la sekvontan lundon.

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Nov. 2007)

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Estrarkunveno 17-09-2007.

Inter aliaj aferoj oni aprobis akcepti demision de Fernando Moral kiel ĉefdelegito de UEA. Li daŭrigos la laboron ĝis trovo de iu nova inter la nunaj delegitoj. La ĉefdelegito ne necesas esti peranto de UEA. La reklamo jam aperis en la forumo esperanto-aktivado. Oni aprobis la kotizojn por la jaro 2008: 31 euroj por individuaj membroj kaj 62 por kolektivaj.

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Nov. 2007)

Hispana Kongreso 2008.

Ĝi okazos en **Cuenca** inter la 3-a kaj la 6-a de julio. Alejandro Pareja, Prezidanto de la LKK, atendas oficialan respondon rilate kongresejon kaj malmultekostan loĝejon. La aliĝilo estos disponebla antaŭ ol la fino de la jaro (kotizoj: 30 eŭroj; por HEF-anoj, 25 eŭroj).

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Nov. 2007)

RENOVIGO DE LA ESTRARO.

Dum la hispana kongreso en Cuenca okazos la renovigo de la nuna estraro de HEF, elektita dum la kongreso de Alcalá de Henares (2005).

SPRITAĴO.

- Joĉjo, vekiĝu. Estas jam malfrue kaj vi devas iri al la lernejo.
- Mi ne plu volas iri al la lernejo.
- Neeble, vi devas iri.
- Mi ne volas. La profesoroj malamas min, la gelernantoj ne volas alparoli min. Kial mi iru?.
- Ĉar vi estas la direktoro.

(Prenita el www.lernu.net)

Kampanjo por nuligi la honoran prezidantecon de la UK 1968 al F. Franco.

La jaron 1968 la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Madrido kaj ĝia honora prezidanto estis Francisco Franco, puĉisto provokinta kruelan militon, diktatoro de Hispanio dum 39 teroraj jaroj kaj ĉefa respondeculo pri ĉirkaŭ miliono da murditoj.

La organizintoj de tiu UK tute forgesis, ke miloj da esperantistoj daŭre ne povis reveni al sia hejmlando kaj ke Franco masakris la esperantistan movadon en la hispana ŝtato. Siaflanke, UEA montris sian mankon de solidareco al la persekutita esperantistaro. Eĉ dum la kongreso, kelkaj programeroj ekzaltis la diktaturon kaj la diktatoron.

La subskribantoj de tiu-ĉi manifesto, esperantistoj vivantaj en la 21a jarcento, malfeliĉas pro la fakto, ke UEA daŭre havas en la listo de honoraj prezidantoj de siaj Universalaj Kongresoj, diktatoron respondecintan pri persekuto de esperantistoj, pri murdo de pli ol unu miliono da homoj, pri teroro, pri kruelo; kaj bedaŭras, ke la hispana Esperanto-movado ankoraŭ neniel agis kontraŭstare al tiu insulto al homa digno.

Pro tio, ni petas al la koncerna asocio, nuligi la honoran prezidantecon de la Universala Kongreso de 1968 al la diktatoro, la generalo Francisco Franco.

MANIFESTO (nur parte):



Dum julio de 1936, generalo Francisco Franco, gvidis puĉon kontraŭ la registaro de Hispanio, la t.n. Dua Hispana Respubliko. La puĉistoj celis forigi la progreseman registaron, antaŭnelonge demokratie elektitan, kaj neniigi ĝian socian bazon. La agado de la faŝisma ribelo baziĝis sur la kreo de ĥaosa etoso kaj terora murdado de tiuj, kiuj favoris la Duan Respublikon, aŭ ne subtenis faŝisman ribelon.

Malbone aranĝita, la puĉo fiaskis preskaŭ ĉie kaj sukcesis nur en afrikaj hispaniaj teritorioj, en parto de la okcidenta flanko de la duoninsulo kaj en Majorko. Tiutempe estis kreiĝanta la ĝermo de estonta dua mondmilito, kaj la puĉistoj ricevadis helpon de la nazia Germanio kaj la faŝisma Italio, sub la laŭdo kaj la beno de Katolika Eklezio. En la alia flanko, la registaron de la Dua Respubliko helpis Sovet-Unio, Meksiko, kaj aliaj. Ankaŭ la demokratia popolo ricevis helpon de miloj da homoj venintaj en Hispanion por batali kontraŭ la faŝismo, la t.n. Internaciaj Brigadoj, kie Esperanto havis belan rolon.

La subskribantoj de tiu manifesto, esperantistoj vivantaj en la 21a jarcento, rektaj persekutitoj, idoj de persekutitoj, aŭ tutsimple solidaraj homoj malakceptantaj totalismon, malfeliĉas pro la fakto, ke UEA daŭre havas en sia listo de honoraj prezidantoj de ties Universalaj Kongresoj diktatoron respondecintan pri persekuto de esperantistoj, pri murdo de pli ol miliono da homoj, pri kruelo, pri teroro.

Pro tio, ni petas al la koncernanta societo, nuligi la honoran prezidantecon de la Universala Kongreso de 1968 al *la diktatoro, generalo Francisco Franco.*

(Prenita el www.homadigno.net)

TRA LA MONDO ...

Reinhard Selten pledis por Esperanto en "pola Davos".

Kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation, la japana mecenato Etsuo Miyoshi, kaj UEA, ĉi-jare Eŭropa Esperanto-Unio forte reprezentiĝis ĉe la prestiĝa ekonomia forumo en la pola urbo Krynica. La budo de EEU staris tuj kontraŭ la enirejo de la ĉefa konstruaĵo, kaj ricevis grandan atenton. La seminarion partoprenis interalie la Nobel-premiito Reinhard Selten, kiu plurfoje publike pledis por Esperanto. Legu pli en: http://www.liberafolio.org/2007/ekonomiaforumo/.

(Prenita el la fako "Novaĵoj" de la paĝaro de HEF: *http://www.esperanto.es/hefesperanto/index.php*)

Esperantistoj en "Second Life".

En radia programo, oni demandis pri esperantistoj en "Second Life" ("Dua Vivo", tiu programo de renkontiĝoj virtualaj). Ja estas esperantistoj en tiu "Dua Vivo", kaj ĝuste dum tiu ĉi semajnfino okazas la "Duaviva Universala Kongreso". Legu tie ĉi:
http://www.freewebs.com/duavivo/kunvenojenduavivo.htm
kaj
http://www.esperantoenmetaversoj.blogspot.com/
En tiu ĉi lasta aperas krome la eksplikoj kiel aliĝi al tiu speciala "ludo".

(Informis: Toño del Barrio (Madrid). 07/10/2007)

Judit Polgar kaj Esperanto.

La revuo "Yo Dona", eldonita de la ĵurnalo "El Mundo" kun la hodiaŭa dato, 03 Novembro 2.007, en la paĝo 130a, informas pri la internacia ĉampionino de lud-ŝako Judit Polgar, kaj inter la multaj laŭdoj al merito de la juna Judit, raportas ke ŝi hejme nur parolis familie la Internacian Lingvon Esperanto, anstataŭ ilia nacia hungara.

(Prenita el diskutejo "iberia esperantistaro". 03/11/2007)

Eŭropa E-Unio kaj ĝiaj kongresoj.

Konfuzon kaŭzis lastmomentaj proponoj de Europa Esperanto-Unio (EEU), okazigi la venontan EEŬ-kongreson 2008 en Germanujo. La estraro de Germana E-Asocio malakceptis la ideon, okazigi ĝin kune kun la Germana E-Kongreso en Essen, pro manko de tempo kaj sufiĉaj informoj. Ankaŭ la ideo, ke la EEŬ-Kongreso okazu rekte antaŭe en Herzberg, ne trovis aplaŭdon.

("Esperanto aktuell". 2007/5)

UEA kandidatas al Nobel-premio pri paco.

Gratulojn al niaj svisaj samideanoj kaj ĉefe al Mireille Grosjean pro ĉi tiu sukceso: du svisaj parlamentaninoj proponis UEA-n kiel kandidaton por la pac-premio Nobel!.

(Informis Renato Corsetti pere de la diskutejo "Komitato de UEA". 17/11/2007).

RAI ĉesis elsendi en Esperanto.

Ekde la unua de oktobro, la Itala Radio (RAI Internacia) ĉesis elsendi kurtondajn radioprogramojn al eksterlando. Tio koncernas ĉiujn programojn en ĉiuj lingvoj, escepte de la itala, angla, franca, germana kaj eble hispana, kiuj restos, sed nur satelite kaj interrete. La lastaj vortoj de la lasta programo en Esperanto estis "Ĝis ne-reaŭdo; nia programo en Esperanto estas finita.

("Esperanto aktuell". 2007/5)

Novaj esperantaĵoj en Israelo.

En decembro 2006 estis emisiita, far la israela filatela servo, poŝtmarkon okaze de la 120-a jubileo de Esperanto. Al tio, sekvis medalo, memorfolio kaj telefonkarto



La medalo, emisiita far de la Registara Kompanio pri Medaloj kaj Moneroj, montras sur la averso gravuritan portreton de Zamenhof, portantan verdan stelon, kun la surskribo "L.L. Zamenhof" (hebree kaj Esperante), kreinto de la lingvo Esperanto, 1859-1917" (hebree). Sur la reverso, Babela Turo konstruita el diversalfabetaj literoj kaj simboloj. Ĉirkaŭe, hebree kaj Esperante, parto de la samtema biblia versiklo "(Sur la tuta tero estis) unu lingvo kaj unu parolmaniero" (Genezo,11,1) kaj "Esperanto 1887-2007".

La Memorfolio, 20x13-centimetra, estis eldonita en speciala limigita eldono de 1.010 numeritaj ekzempleroj. Ĝi prezentas portreton de Zamenhof kaj surhavas la Zamenhof-poŝtmarkon kun la porokaza poŝta stampo. Krome, videblas parto de la tomboŝtono en Varsovio kaj la broŝuro "LIngvo Internacia".

Sur la telefonkarto, de la kompanio "Bezek", aperas la vortoj "Esperanto", "Saluton" kaj "Mondo", Esperante kaj hebree, surfone de la terglobo kaj svinganta mano kun verda stelo, kun konciza hebrelingva prezento de Esperanto.

(El "Israela Esperantisto". N-ro. 146. Somero 2007)

2008 estos "superjaro".

Ĉu vi scias ke ...

Februaro havas 28 tagojn. Kiam ĝi havas 29 tagojn, tiam la jaro nomiĝas superjaro. Kia ajn ĝi estu,

LA ESTRARO DE LA E-GRUPO DE BILBAO DEZIRAS, AL ĜIAJ ASOCIANOJ KAJ AMIKOJ, KIEL EBLE PLEJ DA BONAĴOJ DUM LA NOVA JARO 2008.

NIAJ AKTIVULOJ ...

PEDRO BENEDICTO ÁLVAREZ (1926/1990)



Pedro Benedicto naskiĝis en Bilbao, en domo, kiu situas sur la ŝtuparo, kiu supreniras al Baziliko de Begonja, la 02/10/1926 kaj mortis, 63-jara, en la sama urbo, la 05/07/1990.

Se ni volus resumi en unu vorto lian karakteron kaj lian laboron en nia E-Grupo, certe tiu vorto estus diskreteco: neniam unu vorto pli alta ol la alia, neniam kritikoj al aliaj, neniam la emo aperi ĉe la plej pintaj postenoj de la estraro. Sed sub tiu diskreteco kaŝiĝis homo ege laborema kaj inteligenta, kiu ŝategis interparoladojn kun siaj samideanoj kaj kiu havis vastajn sciojn pri la plej diversaj temoj.

Li aliĝis al la Grupo de Bilbao la 22/01/1971 (jam 44-jara). Tuj post tiu aliĝo, en tiu sama jaro, 1971, jam eniris la estraron kiel voĉdonanto.

En la jaro 1972, kune kun Iciar Arteche kaj José Luis Bringas faris multnombrajn vizitojn al diversaj lernejoj de Bilbao por propagandi la internacian lingvon: Solokoetxe (2 prelegoj), García Rivero (1), Colegio La Cruz (1), Patronato de Iturribide (1), Luis Briñas (4 prelegoj), Franciscana de Iralabarri (1) kaj Nuestra Señora de Begoña (1). El tiuj vizitoj, oni sukcesis organizi diversajn kursojn.

Iom poste, en la jaro 1975 estis nomumita Sekretario de la Grupo, kion li surhavis ĝis la jaro 1982. Kaj en tiu-ĉi posteno li disvolvis tiun diskretan, sed ege efikan laboron, pri kiu ni skribis supre. Dum tiu longa periodo li estis la sola redaktoro de la tiama "Nia Ponto" (en tiu tempo, ankoraŭ ne sub tiu nomo). Ni povas imagi la grandan taskon, kiun li eltenis, dirante ke, en tiu epoko, ankoraŭ ne eblis fotokopii dokumentojn kaj ne estis komputiloj por fari la adresetikedojn: ĉiumonate li devis skribi, sur la kovertoj, la nomojn kaj adresojn de ĉiu asociano kaj de la hispanaj E-rondoj; entute, ĉirkaŭ 200.

Samtempe, li skribis kelkajn artikolojn ĉe diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, ĉefe en "Boletín" kaj la revuo de HEJS. Ankaŭ li ludis gravan rolon en la organizado de kongreseto okaze de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo, en kies kongreslibro ankaŭ skribis artikolon pri Bilbao kaj estis la Sekretario de la LKK.

Bonega parolanto de Esperanto, ni memoras liajn priokupojn pri ĉio, kio rilatis al E-gramatiko, kiun li majstre regis kaj lerte konsilis al tiuj, kiuj lin demandis; ankaŭ restas en nia memoro lia intereso pri neologismoj kaj la maniero kiel li klarigis la signifon de tiuj novaj vortoj, ofte nekonataj de la bilbaoaj esperantistoj.

Li partoprenis diversajn hispanajn kongresojn kaj unu UK: tiu de Londono (1971); ankaŭ gvidis diversajn kursojn en la Grupo de Bilbao kaj en infanlernejoj.

Por fini, same kiel aliaj esperantistoj, ni memoras al Pedro kiel ege bonkora homo, ĉiam preta helpi la aliajn kaj kun la espero vidi pli bonan kaj justan mondon.